# *Ministro rusa vizitas ?inion cele plifortigi la reciprokajn rilatojn*



**Ministro pri eksteraj aferoj de  Rusio kaj ?inio, Serguei Lavrov kaj Wang Yi**

Beijing, mar 22 (RHK) La ministro pri eksteraj aferoj de Rusio, Seguéi Lavrov, deklaris al ?inaj amaskomunikiloj, ke la punoj de Usono kontra? ?inio kaj Rusio estas malprudentaj.

Lavrov alvenis al ?inio por iniciati oficialan laborviziton dutagan en la azia lando, kie li renkonti?os kun sia ?ina homologo, Wang Yi.

La rusa ministro pri eksteraj aferoj sciigis ke la punoj estas aparte doloriga j por la evolulandoj kaj malri?aj landoj meze de la pandemio, kiu limigis la eblecojn de tiuj landoj por garantii normalan vivon al siaj civitanoj.

“Ne estus strange ke la ?enerala sekretario de UN, Antonio Gutérres kaj la altnivela komisiito de UN por Homaj Rajtoj, Michelle Bachelet, prezentus iniciaton por frizigi la punojn kaj krei rezervojn por esencaj varoj.

La? la rusa diplomato, la okcidentaj landoj pretervidis la iniciaton de UN, tiel ke ili ignoris la ideon de la rusa prezidento Vladimir Putin starigi verdajn koridorojn liberajn je punoj kaj aliaj artefaritaj baroj.

Por Lavrov, Usono estas malanta? la malagnosko de tiuj iniciatoj kaj premis siajn okcidentajn partnerojn por ke ili ne forigu punojn.

Li aldonis ke la “modelo de interago inter Rusio kaj ?inio estas libera je ideologiaj ligoj, ne submetita je oportunismoj kaj celas neniun landon”.

Lavrov emfazis ke Beijing kaj Moskvo ser?as internacian ordon “justan kaj demokratian, bazitan sur la interagadoj inter la landoj”.

Lavrov aldonis ke la mondo travivas “kompleksajn transformojn” pro la “kreskanta influo de la novaj centroj ekonomiaj, financaj kaj politikaj”, kiuj “kondukas nin al sistemo vere multpolusa”, li emfazis.

La? Lavrov, la rilatoj inter la du landoj estas “en  plej bona momento de la tuta historio” kaj la “dialogo reciproke fida kaj respekta devas esti ekzemplo por aliaj landoj”.

fonto: Telesur

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/251452-ministro-rusa-vizitas-cinion-cele-plifortigi-la-reciprokajn-rilatojn](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/251452-ministro-rusa-vizitas-cinion-cele-plifortigi-la-reciprokajn-rilatojn)

**Radio Habana Cuba**